# *Cuba Sabe 2020 kaj la valoroj de la kuba kuirarto*



Havano, jan 13 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kaj la ?efministro, Manuel Marrero kune kun gastoj kiel Frei Betto, ?eestis la fermon de la II- Internacia Metiejo de kuirarto Cuba Sabe 2020 okazinta en la havana hotelo Iberostar Grand Packard.

La evento sesiis de la 9-a ?is la 12-a de januaro kaj ?in ?eestis pli ol 200 delegitoj el Usono, Meksiko, Hispanio, Britio kaj Italio. ?ia ?efa celo estis impulsi la valorojn de la kuba kuirarto, ?us deklarita kultura hereda?o de nia lando.

Dum la fermo, la ministro de turismo Juan Carlos García, anoncis la fondon de la Kuba Asocio de Sommeliers, kiu la? li asertis, kontribuos al protektado de la valoroj de la kuba gastronomio.

Li agnoskis ke tiaspecaj eventoj evidentigas ke Kubo povus esti vizitata ne nur kiel tradicia destino ligita al suno kaj strando, sed anka? pro ties gastronomiaj alloga?oj.

La ministro anoncis la alvokon por la tria eldono de tiu ?i evento, okazonta de la 14-a ?is la 16-a de januaro 2021.

La evento estis organizita de la entreprenista agentejo de kultura turismo Paradiso, la ministerio de turismo, la Kuirarta Federacio de Kubo kaj la hotelagentejo hispana Iberostar. Anka? kelkaj naciaj produktistoj ali?is al la organizado kaj tiel restas kreitaj fortaj ligoj kun diversaj kuiristoj de la insulo.

Fonto: Prensa Latina

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/211761-cuba-sabe-2020-kaj-la-valoroj-de-la-kuba-kuirarto

**Radio Habana Cuba**